En la antaŭlasta jaro s-ro Fuĝimaki K., gvidanto de Numazu Esperanto-Rondo (Numazu estas urbo situanta 150 kilometrojn okcidente de Tokio) plenumis sian Esperanto-Kurson sur la retoj. Ĝi estis por la komencantoj dum tri monatoj (ekde la mezo de septembro ĝis la mezo de decembro). La kurso sukcese finiĝis pro lia energia laboro kio aŭspiciado de multaj aliaj esperantistoj. Lastjare li daŭre plenumis la mezgradan Esperanto-kurson ankaŭ dum tri monatoj (ekde la mezo de aprilo ĝis la mezo de julio). Ni ĉiuj aprecas liajn plenumojn kiel grandan kontribuon kaj tre valoran provon por disvastiĝo de Esperanto.

Lastatempe, s-ro Hotta H., kiu loĝas en Oosako, la due granda urbo de Japanujo, faris unikan komputilan programon, kiu celas solvi la problemon de supersignoj. Nun ni esperantistoj havas ne malgrandan problemon pri traktado de literoj kun supersigno per komputilo, pri kio oni

internacie diskutadas longe sur kelkaj gazetoj kaj organoj. (La komputilo ordinare kapablas trakti literon kun supersigno ne kiel unu literon, sed kiel du literojn. Do, la maŝino skribas, ekzemple kiel "S^" aŭ "A^S" sur la ekranon).

Hodiaŭ japanaj esperantistoj, dank' al li, povas legi kaj skribi la esperantan literon normalan (litero kun supersigno) sur la ekrano de la persona komputilo. La programo estas dediĉita de li kiel la "PDS" al nia dispono. (N.B. La programo estas uzebla nur sur la japana klavaro)

Cetere, en la "PDS" troviĝas ankaŭ unika programo, ekzemple, kiu ludas muzikon kun muzikdatumoj (muziknotoj konvertitaj en komputilaj kodoj) sur la komputilo. Nun en la DATUMLIBRO ekzistas multe da muzikdatumoj, ekzemple, "Espero", "Tagiĝo", "Romanze" kaj aliaj. Tial ni povas operacii la komputilon aŭskultante kiel fonmuzikon tiujn bonajn muzikojn, kiujn la sama komputilo ludas samtempe. Ĝis nun ni esperantistoj utiligas komputilajn retojn nur mallonge, sed certe ni pravas, ke ili estas elstare utilaj iloj. Jen estas aliaj ekzemploj de uzmaniero de la retoj:

—Rapide sciigo de la agado de ĉiu Esperanto-Rondo kaj persona informo (ekz. geedziĝo) al ĉiuj esperantistoj, kiuj loĝas dise en la tuta lando.

—Starigo de demandoj pri Esperanto, komputilaj aferoj, k.a. kiujn iu ne kapablas solvi mem, al aliaj esperantistoj.

—Estas facile al ĉiuj informi la planon de kongreso kaj peti helpon pri ĝia aranĝo.

—Peto pri tranoktejo de vojaĝantaj alilandanoj.

—Transsendo de manuskriptoj al redaktoro de la organo.

—Rekta interparolo kun lokaj esperantspertuloj, ĉar multe da personoj uzas la retojn kiel mi supre diris, kaj precipe nun diversaj lingvaj (neesperantaj) SIG'oj funkcias vigle (tio signifas, ke ekzistas pli multe da fremdalingvo-amantoj), do, oni povas diveni, ke ekzistas multaj latentaj uzantoj neesperantistaj aŭ ekesperantistaj,

kiuj legas la esperantajn informojn kaj skribaĵojn sur la Esperanto-SIG'oj. Inter ili, kiuj interesiĝas pri Esperanto aŭ volas lerni ĝin kun ni iom post iom, aperas sur la esperantan ĉambron. Kaj krom tiuj, kompreneble esperantistoj neuzantaj la retojn, rapide komencas uzi ilin. Tial la Esperanto-SIG'oj fariĝas pli kaj pli

grandaj. Ju pli multiĝas la uzantoj, des pli certe vigliĝas ĉiu Esperanto-SIG'o. Do, la komputila reto funkcios kiel la plej bona esperantujo en la nemalproksima estonto.

P.S. Pri internacia komputila reto, nun ni utiligas ĉefe "CompuServe" por interkomuniki kun esperantistoj en Eŭropo kaj Usono kaj aliaj lokoj, sed pro alta

telekomunika elspezo, bedaŭrinde la internacia telekomunikado per la persona komputilo ne tiel vigladas.

<sup>1</sup> Fakgrupo. -red. EUSA

<sup>2</sup> Publikvaro. -red. EUSA

<sup>3</sup> Interbabilado. -red. EUSA

## MEZEPOKAJ ĈINAJ METODOJ PROGNOZI TERTREMOJN

de Andrei Kolganov

[S-ano Kolganov estas *Esploranto en la Instituto de Orientologio de la Uzbekistana Akademio de Sciencoj en Taŝkent, Uzbekio, Sovetunio. Li proponis al ni la jenan resuman artikolon, kiun ni supozis interesa ĉar tiom el la anoj de ELNA loĝas ne nur en Kalifornio sed ankaŭ tute apud aŭ eĉ sur grandaj terfendoj.*]

"...ŝanĝiĝas ne esenco, nur dato."

—Lord Byron

En antikvaj kaj mezepokaj tempoj en Ĉinio oni amasigis ne malgrandan sperton en tertremaj antaŭdiroj. Detala esplorado de antikvaj scioj en tiu ĉi sfero estas afero de estonteco. Malsupre ni provos surbaze de ĉinaj historiaj fontoj priskribi iomajn observadojn de fenomenoj antaŭantaj tertremojn.

Unuaj mencioj pri tertremoj troviĝas en ĉinaj skribitaj fontoj jam antaŭ nia epoko. Komence de la dinastio Han (206 a.K.—220 p.K.) informojn pri tertremoj oni enmetadis en la partojn de la dinastiaj ĥronikoj dediĉitaj al eksterordinaraj eventoj. Tamen la informoj estas relative ne multnombraj. De la dinastio Tang (618—907) kaj precize post la dinastio Song (960—1279) kvanto da faktoj signife pligrandiĝas; multnombrajn informojn pri tertremoj enhavas historiaj verkoj de epokoj Ming (1368—1644) kaj Qing (1616—1911).

Al plej gravaj fontoj laŭ la rigardita temo apartenas la jenaj: *Hou Han Shu* (Historio de la dinastio Malfrua Han), *Wei Shu* (Historio de la dinastio Wei), *Jiu Tang Shu* (Malnova historio de la dinastio Tang), *Kai Yuan Zhan Ji* (Libro laŭ astrologio), enciklopedioj *Taiping Yulan* kaj *Cefu Juangui*, *Da Ming Shi Lu* (Regadĥronikoj de imperiestroj de la Granda Ming dinastio), *Di Zhen Ji* (Skizoj pri tertremoj), *Gujin Tushu Jicheng* (Kolekto de antikvaj kaj nuntempaj libroj) kaj ankaŭ

multnombraj priskriboj de regionoj kaj provincoj (*Fang Zhi*) de la epoko Qing.

Antikvaj ĉinoj distingis sekvajn ĉefajn fenomenojn kiuj antaŭiras tertremojn: sismaj bruoj, sisma lumo-brilo, antaŭirantaj puŝoj, ŝanĝiĝo en nivelo de subteraj akvoj, nenormalaj meteologiaj fenomenoj, nekutima konduto de bestoj.

Sisma bruo estas grava antaŭtertremaj fenomeno, priskribita en la ĉinaj fontoj. En la "antaŭsignoj", parto de dinastia historio *Wei Shu* oni skribas, ke en 476-a jaro "en Shanxi provinco aŭdiĝis bruo simila al tiu de tondro, ĝi sonadis de okcidento dekdufoje, kiam bruoj finiĝis okazis tertremo". *Jiu Tang Shu*: en 2-a monato de 734-a en Qinzhou okazis tertremo; antaŭe homoj aŭdis iajn subterajn bruojn de nord-okcidento, poste sekvis la tertremo. *Chenghua Shi Lu* (regadĥroniko de imperiestro Chenghua): en urbo Qiongzhou de Guangdong provinco 4-an de aprilo, 1468 dum nokto okazis tertremo; antaŭ ĝi sud-okcidente tondrobruis, post tio sekvis forta tertremo.

En mezepokaj verkoj troviĝas ankaŭ informoj pri sismaj lumoj. Ekzemple, *Wanli Shi Lu* (Regadĥroniko de imperiestro Wanli) atestas, ke en urbo Wuchang de Hubei provinco 26-an de majo, 1509 en la ĉielo ses aŭ sep foje ekflamis bluaj lumoj kvazaŭ fulmo akompanata kun bruo, post kio okazis tertremo. *Zhengde Shi Lu*: la 30-an de decembro, 1513 en regiono Yuejun de Sichuan provinco en la ĉielo estis videbla fajra globo de kiu devenis tondrosimila bruo; sekvan tagon okazis tertremo.

Multfoje ĉinaj fontoj mencias, ke ofte fortajn tertremojn antaŭiras serio de malfortaj puŝoj. Antaŭ fortaj tertremoj oni ofte observis ankaŭ ŝanĝojn en nivelo de subteraj akvoj. Kiel regulo tio estis ia rivero aŭ kanalo kiu antaŭnelonge de tertremo subite kaj rapide sekigiĝis. Iufoje el akvejoj soniĝis strangaj sonoj. Krom tio, kelkaj malnovaj libroj priskribas ankaŭ ŝanĝojn

en konsisto, gusto kaj temperaturo de akvo, ekz. "la akvo en putoj surprize malpuriĝis", "la fluanta akvo estiĝis ruĝa kiel farbo", "la gusto de puta akvo ŝanĝiĝis—la dolĉa akvo saligiĝis, la sala fariĝis dolĉa" ktp.


Multnombraj estas atestoj pri nenormalaj meteologiaj fenomenoj antaŭ tertremo, tiaj kiel neatendita varmego, torentaj pluvoj, uraganoj, altiĝinta nubeco kaj nebuleco, sekvetero aŭ superakvego. Unu el libroj parolas pri tiaj signoj tiel ĉi: "la nuboj kovris la tuta ĉielon, la suno senbriliĝis, tage blovis vento kaj ĉio malheliĝis, kaj dum la nokto ne estis videbla la luno".

Komence de la epoko Tang (618—907) estas troveblaj skribitaj materialoj pri neordinara konduto de bestoj antaŭ tertremoj. En unu el la fontoj de tiu ĉi periodo—*Kaj Yuan Zhan Ji*—oni rakontas, ke antaŭ tertremoj "sur stratoj kaj stratetoj kolektiĝas pepantaj musoj, birdoj kaj bestoj krias". Laŭ la alia verko, kiam bovoj kaj ĉevaloj levas supren siajn kapojn, kokoj klukas kaj hundoj bojas—tio profetas tertremojn. Dank' al longtempa empiria observado aperis konkludo—antaŭ tertremoj la bestoj kondukas strangmaniere.

Tremprognozoj en mezepokaj tempoj kutime sin bazis ne sur ia aparta simptomo, sed sur komplekso da simptomoj. Observoj, supre pritrakitaj, permesis al la mezepokaj ĉinoj entrepreni difinitajn rimedojn por malebligi aŭ minimumigi viktimojn kaj detruojn kaŭzatajn de tertremoj. Inter ili—kontraŭsismaj rimedoj en arkitekturo kiuj garantiis firmecon de konstruaĵoj; provizora loĝado ekster la domoj se ekzistis danĝero de tremripetoj ktp.

Oni devas agnoski, ke nuntempe prognozado de tertremoj ne ĉiam estas efektiva, kontentiga kaj eĉ ĝustatempa. Pro tio, do sendube meritas specialan atenton la scioj en tiu ĉi fako kiujn akumulis generacioj pasintaj.





## LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

### [Ankoraŭ pri fakaj terminoj.]

La artikolo de Anna Löwenstein (*Esperanto USA*, 1990(4), p. 6-7) enhavas saĝajn konsilojn pri la formado de novaj vortoj en Esperanto. Sed la aŭtorino, kritikante mian kontribuadon al la faklingvo de Esperanto, plurfoje eraris. Tiel, ŝi unuloke kritikis mian elekton de "alliniigi" (align) pro tio, ke supozeble mi dezirus similigi ĝin al latinidaj lingvoj. Kaj aliloke, ŝi kontraŭdire kritikis fakvortojn kiel "distoksi" (contaminate) kaj "vatraĵo" (coolant) pro ilia fremdeco al eŭropaj esperantaj parolantoj.

Ŝia kritiko kontraŭ la nova sufikso -enz/ estas neniu kritiko. Oni bezonas jardekojn por akcepti -io anstataŭ -ujo por landnomoj. Eble pasos multaj jaroj, ĝis kiam Esperanto fine akceptos la sufikson -enz.

Ĉu vere estas tiom evidente, kiel ŝi asertis, ke "blankigilo" estas A. bleach? Kiel ne A. whitewash? Ĝi signifas nur "io, kiu blankigas" (something that whitens). Kaj fakte PIV (ĉe artikolo por "tomb/o") citas jenan esprimon: "... (tomb)oj blankigitaj", t.e. A. white-washed tombs.

Ŝi skribis, kvazaŭ la faklingvo estus io forfermita, fremda al la ordinaruloj. Jes, sed ne tute. Tiel, la terminoj de kemio fluas en la ĝeneralan lingvon: katalizenzo, katalizilo (catalyst), detergento, brulpilo (fuel cell), plasto, nutroaldonaĵo (food additive), pelgaso (aerosol propellant), ktp. Ne estas neta divido inter kemio (aŭ aliaj sciencoj) kaj la ĉiutaga lingvo.

Ŝi diris: "What is important is that new words should be understood". Mi demandas: komprenitaj de kiu? Nu jes, naturalismaj vortoj kiel "radiatoro" estas

kompreneblaj al okcidentanoj. Sed al ĉinoj ili estas fremdaj.

Same kiel ŝi, mi spertas problemojn ĉe la traduko por A. contaminate. Estas malfacile juĝi, ĉu A. contaminate kaj A. pollute estas la samaj aferoj. La lingvoj, kiujn mi konsultis, ĝenerale rekonas diferencon inter ili. Tie ĉi kaj aliloke mi volas emfazi, ke mi nur konsilas, ne parolas elkatedre pri esperantaj vortoj. Tiel, la publiko kaj la fakuloj decidos, ĉu mia "distoksi" estas bona termino aŭ ne.

Laŭ s-ino Löwenstein, ni povas probable flankenlasi la esperantajn fakulojn ("to hell with the *Bildvortaro*"???) kaj fidi la praktikan kaj neerareman sperton de ĉiutagaj parolantoj de Esperanto. Do, ĉu la multjara klopodado de R. Eichholz estis vana? Mi tute ne kredas tion. La kreado de vortaroj kaj terminaroj estas peniga afero. Tiu, kiu ne kredas min, mem provu prepari novan, ampleksan anglan-Esperantan vortaron.

Doug Portmann

[La jena letero, kun dato 1990 02 09, devis aperi en n-ro 1990(2) de *Esperanto U.S.A.*, sed ĝi malaperis samtempe kun mia pasintjara diskopaneo. Nun mi retrovis la originalon, kaj jen—malfrue—kelkaj komentoj pri la Raŭmismo de d-ro Giorgio Silfer de la Kooperativo de Literatura Foiro.]

En via "Editorial" sur paĝo 2 de ELNA-Newsletter 1989:5 vi komentarias pri raŭmismo. Via komentario estas tre interesa, kaj ĝi stimulas al interveno. Mian intervenon fakte ne motivas iu ajn specifa rajto je ekzegezo: kvankam mi estis (kun sesdeko da aliaj) unu el la subskribintoj kaj eĉ rektaj kompilintoj de la Manifesto en Raŭmo, raŭmismo ne havas oficialan mentoron, ĝi estas fenomeno tre ampleksa kaj ne reduktiĝas je unu dokumento. Do min puŝas al interveno nur la amo al la vero, kaj min rajtigas la fakto ke vi, prave, mencias la aktivecon

de la kooperativo de Literatura Foiro, kiun mi prezidas nuntempe.

Estus oportune, por ke la legantoj de ELNA-Newsletter orientiĝu, publikigi viaflanke almenaŭ la tekston de la Manifesto: interalie por emfazi ĝian dekan datrevenon. Aliflanke, kiel dirite, la raŭmismo ne estas nur tiu Manifesto, same kiel la esperantismo ne estas nur la Deklaracio de Bulonjo-ĉe-Marco. Necesus, por vere profundigi en la tuta fenomeno, legi almenaŭ la artikolojn de Jerzy Leyk en *Pola Esperantisto* (1983), la aktojn de la simpozio pri strategiaj demandoj de la esperanto-komunumo (Varsovio, 1984), la eseojn de Sándor Révész (1987), la Konkludojn de la konferenco en Segedo (1988), la kulturpolitikajn raportojn de LF-koop...

Sed jam de la simpla lego de la Manifesto rezultas malvera via aserto ke la raŭmistoj "nomas praelismo la sintenon, ke oni devas varbi novulojn al esperanto". Neniu aktivulo ligita al raŭmismo asertas tion, sed male. Simple, li informadas pri esperanto alimaniere ol la praelanoj. Raŭmismo ja ne kredas pri la slogano "via dua lingvo", kaj rifuzas aliajn sloganojn kiel "la angla estas nia malamiko". Raŭmismo pledas por la praktika utiligo de esperanto kiel kulturlingvo. Tiusence, raŭmistoj perceptas Esperanton ne kiel premgrupon, sed kiel minoritaton kiu vivas propran modelon. La akcento ne estas sur la mondo (disvastigi Esperanton por plibonigi la socion), sed sur la individuo (utiligi Esperanton por plibonigi sin mem, sian familion, siajn geamikojn kaj tra tio eble ankaŭ la socion). La atingoj de la institucioj inspiritaj de la raŭmismo (LF-koop, KCE kaj aliaj) estas sub viaj okuloj. Sen la raŭmismo ne ekzistus la bonkvalitaj revuoj, kursoj, diskoj, kasedoj, libroj kiujn ni produktas. Danke al ili esti (kaj resti) esperantisto havas kulturan sencon. Por la raŭmistoj, esperanto helpas por profili apartan kulturan identecon. Kaj la tendenco diras ke ili pravas: vidu nur la diversajn aŭtonomajn kulturcentrojn kiuj multiĝas en Eŭropo—post KCE en Svislando, La Kvinpetalo en Francio, La Vojnodo en Belgio...

# RECENZE

Malovec, Miroslav: *Gramatiko de Esperanto*. Trebic: 1988. 102 p.

Kvankam referenca verkaĵo de nia regulo submetiĝas ankaŭ nia PAG. Oni plendis pri diversaj aspektoj de la menciita libro, kaj kun kelkaj el tiuj plendoj, ankaŭ mi kunsentas. La unua neallogaĵo ĝia estas la grandeco, kiu ne multe plaĉas al studentoj de Esperanto (kial tiel grandega libro por tiel simpla lingvo?!). Poste, la lingvaĵo de la libro ne estas inter la plej facilaj, kaj ankaŭ tio malplaĉas al tiuj, kiuj ankoraŭ lernas Esperanton. Spite tiujn kaj aliajn "difektojn" PAG restas, kaj longe restos, baza verkaĵo por esperantistoj, sed ne nepre ankaŭ por studentoj. Prilingvaj libroj aperis kaj daŭre aperas en Esperanto, kaj tio estas normala afero por vivanta lingvo. Ŝajnas tamen, ke la ĝis nun aperintaj gramatikaj libroj ne nur ne sufiĉas sed ankaŭ ne ĉiam taŭgas, kaj ankaŭ tio estas normala: ekzistas jam skoloj (eble eĉ tro da ili) ankaŭ en Esperanto.

Libro neapartenanta al la tro "famaĵ" skoloj, sed ne nepre senvalora, aperis en 1988, en Trebic (Ĉeĥoslovakio), kaj mi kuraĝus nomi ĝin frato malgranda, sed pli klara, de PAG. Miroslav Malovec (MM) proponas al ni libron, kiun mi sopiris plurajn jarojn. Libron, kiu priskribu al ni la tutan Esperantan gramatikon en lingvaĵo facile komprenebla. Libron, kiu insistu pri la reguleco de Esperanto, kaj ne pri ties neregulaĵoj (kiel tro faras PAG).

Modestaspekta, La *Gramatiko de Esperanto* priskribas al ni Esperanton, tian kia ĝi devus esti, kaj pro tio, mi proponas ĝin al tiuj, kiuj jam enuas pro PAG.

En ok ĉapitroj, MM portas nin tra: la kvalitoj de Esperanto (ĉu bonaj aŭ malbonaj) kaj lingvaj aferoj; la fonetiko de Esperanto (interesa la fakto, ke laŭ MM, ŝi estas duonvokalo, sed ne ankaŭ j), mi ankaŭ demandas retorike, kiam niaj fonetikistoj kunsentos pri la sonoj de Esperanto?; dank' al Io ke Esperanto ne estas unu inter tiuj lingvoj uzantaj pseŭdoetimologian literumadon, kaj sekve por la Esperanta ortografio en la prezentata libro necesis nur

mallonga ĉapitro; pli longan kaj bonvenan ĉapitron bezonis la vortfarado en Esperanto—studante ĝin, oni povas konstati, ke Esperanto ne estas tiel eŭropeca, kiel iuj ŝatus trudi; la plej longa ĉapitro pritraktas la morfologion de Esperanto, tamen ankaŭ por legi, kompreni kaj ekutiligi la konsilojn el tiu ĉapitro ne necesas tuta vivo (komparu la koncernen ĉapitron de la libro kun simila ĉapitro en la gramatiko de via denaska lingvo!); certe, ankaŭ la sintakso de Esperanto trovis sian lokon en la libro de MM, kaj denove la spaco estas senteble (aŭ videble) malpli ampleksa ol tiu postulata de la, ekzemple, angla sintakso; unu inter niaj disputataj temoj—la vortprovizo de Esperanto—ne okupas tro ampleksan spacon, kaj tio montras la intuicion de la aŭtoro: la lingvon ne pligrandigas verkinto de libro, aŭ eĉ ne skolo, sed la parolantaro mem, kaj tiel devas esti; por tiuj, kiuj interesiĝas pri stilistiko, la aŭtoro donas kelkajn—bedaŭrinde ne sufiĉajn—konsilojn.

Jen mallonge, priskribo de la enhavo. Ne estis kaj ne estas mia celo eniri detalojn. La leganto mem decidu pri la utileco de la libro, sendube malsama de ulo al ulo. Mi mem ĝuis la libron kaj konsideras ĝin utila, eĉ se mi ne kunsentas kun la tuta enhavo, kaj precipe kun la preseraroj, kiuj bedaŭrinde ne mankas.

Ionel Onet

"Lorjak": *Mariagnes*. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 219 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: kodo MAR003, prezo \$10.25 (nemembroj)/\$9.75 (membroj)

En la dampita zumado de l' komforta aŭtomobilo, la vojo horloĝe malvolviĝis trans la fronta glaco kun ripeta monotoneco. Nigra strio el gudro, ĉiam memsimila, ĝi dupartigis ĝis la horizonto panoramon el mil detaloj, diversaj kvankam

ripetiĝintaj, en la printempa eksplodo. Dekstre kaj maldekstre, la kampoj kvazaŭ karuselis, rapidegaj proksimvice—prokraste atentebaj ĉe la fono; kaj apriori ankoraŭ brunaj el la ĵusa vintro.

Se vi povas trapenetri tiun konfesinde iom barokan duonolineon, vi jam trovos vin ene de nemaltrfinda farso el la plumo de la konata "Lorjak". Se vi ne povos ĝin penetri... nu, vi tamen povas renovigi vian abonon al *Kontakto*.

Mallonge: la "heroo" ne tro heroa, Roĝer Mellion, emeritulo kiu plezuris kantante en la (cetera esperantista) ĥoro "La Cecilia" en Parizo, renkontas novan ĥoraninon, la belan Maria Dupont, en kiu li tuj rekonas la iaman filmstelulinon Agnes de Vitry. Roĝer tuj kaj pasie enamiĝas kun Maria-Agnes, kio cetera ne tre plaĉas al lia ankoraŭ neemeritiĝinta edzino, Simone, kiu siavice estas persekutata de afabla ĝentlemano, Anatol de Batifol, kies intereson altiris reklamo de "mistraktata edzino" enigita en iun revuon ne de Simone sed de la filino Persika, kiu siavice enamiĝas kun la juna frato de Anatol, la aspiranta aktoro Baltazar... La tuton bone resumas Maria-Agnes sur paĝo 171:

"Mi subite agnoskis, ke neniam ludinte vodevilon en mia kariero, mi komencis hodiaŭ. Ne komediante. Konsentu, ke la situacio estis vodevila: la brava dommastrino, kiu malfermante pordon, abrupte malkovras en *sia* lito kaj en *sia* propra ĉemizo, la adultamikinon de sia edzo ĉirkaŭatan kaj dorlotatan de l' tuta familio. 'Ĉielon! mia edzo...' Nur mankis longa kalsono al la ĉefa aktoro."

Kvankam la stilo estas, kiel mi jam sugestis, baroka, foje okazas sufiĉe rekta parolado, ĉefe ĉe la kokrita s-ino Mellion. Ekzemple, sur paĝo 163:

"Okazas, ke mia porka edzo instalas hejme sian putinon. Mi ĵus malkovris ŝin en mia lito! Mi estas tie ĉi por venĝi min."

Aŭ en la jena dialogo inter Roĝer kaj Simone sur paĝo 185:

"Simone! Mi estis tirita en nerezisteban kirloventon. Sed mi neniam celis moki, nek vundi vin. Vi neniam ĉesis esti mia amata edzino. Mi estas pli viktimo ol kulpanto. Viktimo de troa romaneco, de perfida sentimentaleco. Mi neniukaze forgesis vin."

"Jen kio estas konsola! Alivorte, kiam vi fikis ŝin, vi

elvokis min. Mi ĝoju!"

Aŭ: Simone, reveninte hejmen la tagon post la klasika kunveniĝo, je eniro en la litoĉambro:

"Odoras putine!"

La dorlotbesta preskoboldo de la Hungara Esperanto-Asocio sufiĉe ĝisfunde maĉis ĉi tiun verkon; la leganton ĝenos duonperditaj (ĉe substantivoj, ne ĉe adjektivoj) akuzativoj, adverbigitaj adjektivoj, perditaj linioj ktp. Tio ne ĉiam estas malhelpo; laŭ mia eble erara kompreno, la amnezia Maria-Agnes rapide regajnas sian memorkapablon nur dank' al la koboldo (p. 160-161). Kaj mi proponas kison (se virino) aŭ manpremon (se viro) al la unua persono, kiu ĝuste klarigas la frazon "Sed delonge S-ro Mellion ne pen povis nei sion konatan ligon kun Mania" (p. 160).

Bela, kvankam densa, Lorjakaĵo, sed nur por la sperta (lingve kaj alie) esperantisto.

Don Harlow

**Pandemonio.** Malagá: Pandemonio, 1987. 80p. Ĉe ELNA: Kodo PAN003, Prezo \$11.50 (nemembroj)/\$10.90 (membroj)

Se pri la (eventuala) apero de la vivo sur Tero temas (pseŭdo)science la unua ero de hispana *Pandemonio*, pri morto ni povas legi plurajn prozaĵojn, sendube multe pli altkvalitajn ol la t.n. sciencaj artikoloj, kiuj malfermas la libron. Mi devas konfesi, ke legante la unuan parton mi estis forĵetonta la libron. Stimulis min plu legi la nomoj de la aŭtoroj prezentitaj en la dua parto. Mi eĉ nun demandas min, kial necesis trudi tiun unuan parton al la legantaro. Eventualan respondon al tiu demando devus akompani ankaŭ respondo al la demando: Kiel eblas listigi poemon (*Mi*) sub "Rakonta prozo". Vere mankas rimo en la koncerna poemo, sed versojn (kaj certan pulson) ĝi havas, kaj laŭ mi ĝi ja *estas* poemo (kies valoro substrekendas).

Legante la du rakontojn de Alberto Franco (*La lasta vojaĝo de kara Vilĉjo kaj La enĉerkigito*) mi sentis ian eliadescan atmosferon. Kiel en la fikciaj prozaĵoj de Mircea Eliade, realo kaj transreala interplektiĝas kaj la leganto povus trovi sin en tute realeca etoso, kiu fakte estas transreala. Ankaŭ la rakonton de Georgo Kamaĉo *Ekster la kadro* karakterizas sama atmosfero. Tiuj tri prozeraj estis por mi la plej plaĉaj el la tuta libro. La sola poemo, *Mi* (Georgo Kamaĉo) devus gajni (pro sia soleco?) mian simpation. Sed, laŭ mi eĉ en

poesia antologio ĝi okupus bone merititan lokon. Kiom da tiaj *mi* estis/as en nia pacama mondo? Se ĝenerale la libro ne estas tre facile legebla (la lingvaĵo de la libro povas esti preter la ebloj de multaj literaturoj), la lingvaĵo de Kamaĉo estas sendube la plej malfacila. Jen sufikso *iĉ*, jen *kalkulatoro*, jen aglutinaĵoj ne ĉiam facile deĉifreblas, jen esprimoj ne tro oftaj. Se por nespertulo tiaĵoj donas malfacilaĵojn, al la verkaĵoj mem la lingvaĵo de Kamaĉo donas valoron. Eble la plej streĉa rakonto estas *Malantaŭ la pordo* de Francisko Ksavero Moleono. Mi ŝatus spekti kinon bazitan sur tia ideo. En *Pano buŝon ne serĉas* (sama aŭtoro) mi trovis paragrafon, kiu estas entute poemo: *Pasas tempo. Alvenis moment'.* Unua paŝo iron direktas. *Spirretene li antaŭenĵetas la piedon livan. Nenio okazas...* Pli valora tiu paragrafo ol la tuta *Rakonto en tri minutoj*. Pli proksima al niaj ĉiutagaj travivaĵoj estas la noveleto de Maria José Quesada *Punenda peko. Ĉu estas pli sordida la amo inter du personoj de la sama sekso, ol la amo inter du malsamseksuloj? Gravas la amo, kaj ĝi estas belega tiel direktita al anĝelo, kiel al monstro; tiel direktita al virino, kiel al viro.* Jen demando kaj respondo. Ĉu ni—la homaro—pretas akcepti tion? Eble estas la tempo revizii niajn konceptojn pri amo.

Valora libro (ĉu hazarde kvar el la 17 libreroj estis premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA?). Valora eĉ se multekosta.

Ionel Onet

**Zamenhof, Marko kaj Lazaro: Proverboj.** Helsinki: Fondumo Esperanto, 1989. 704 p. Ĉe ELNA: Kodo PRO002, prezo \$40.00 (nemembroj)/\$38.00 (membroj)

**Zamenhof, Lazaro Ludoviko: Proverbaro Esperanta.** La Laguna: Stafeto, 1974. 167 p. Ĉe ELNA: Kodo PRO003, prezo \$12.50 (nemembroj)/\$11.85 (membroj)

**Zamenhof, L. L., k.a.: Proverbaro.** Tesaloniko: Tamtama Eldonejo, 1976. 146 p. Ĉe ELNA: Kodo PRO001, prezo \$5.50 (nemembroj)/\$5.20 (membroj)

Oni asertas, ripete, ke la proverboj estas montriloj del' saĝeco de popolo. Laŭ mi, ili montras la pensmanieron de la popoloj, kaj fine, de la tuta homaro. Ili elmontras ĉiujn aspektojn de la vivo, kun ties bonaj kaj malpli bonaj ecoj. Ili estas, foje, kontraŭdiraj, fojfoje, nur parte veraj, alifoje, tute ne veraj. Ili estas edukaj, sed povas esti ankaŭ trivialaj kaj vulgaraj. En ili troviĝas vero kaj mensogo. Ne ĉiam kaj ne ĉie validaj, la proverboj estas parto de la tutmonda kulturo, kaj ilia vereco aŭ valideco dependas de tempoj, lokoj, homoj. Ĉiukaze, la fakto ke kolektoj de proverboj (foje plurlingvaj) daŭre aperis/aperas ĉie tra la mondo pruvas la intereson, kiun la proverboj ĝuas ĉie.

Kiel ĵus menciite, proverbaroj aperas ĉie, sed ilia utilo estas relativa kaj ilia legantaro limigita. Pli konkrete: se oni publikigus proverbaron en, ni diru, ĉiuj latinidaj lingvoj, ĝi ne multe helpus al, ekzemple, turko en Bulgario, kiu parolas tri lingvojn: turke, bulgare, ruse.

Por havigi trezoreton el la tutmonda kulturo ĉie en la mondo, dum la jaroj, aperis proverbaroj Esperantaj, kiuj montriĝis sukcesaj (alie, mi ne povas klarigi la (re)eldonadon de tiaj libroj). La Libroservo de ELNA havigas al tiuj interesataj tri tiajn librojn.

Inter ili, la plej malnova kolekto estas tiu de Marko kaj Lazaro Zamenhof, publikigita parte jam en la pasinta jarcento. En 1980, oni eldonis la tutan kolekton (inkluzive la aldonojn el la fruaj jaroj de nia jarcento) en libreto enhavanta—laŭ Adolf Holzhaus—13155 proverbojn en la lingvoj: rusa, pola, franca, germana kaj Esperanto.

La fama eldonisto Juan Regulo Perez eldonis en 1961, kaj reeldonis en 1974, alian proverbaron. Ĝi enhavas 2630 proverbojn kolektitajn de L. L. Zamenhof, kaj estas fakte parto de la supre menciita proverbaro, al kiu aldoniĝis la trafikaj komentoj de Gaston Waringhien.

Alia proverbaro, iom malsama al la antaŭaj, estas tiu eldonita de Tamtamo, en 1976. En ĝi, la proverboj estas aranĝitaj laŭ verseraj piedoj (trokeoj kaj amfibrakoj). La proverboj estas listitaj en grupoj, laŭ la nombro de piedoj (de 2 ĝis 23) + grupo de proverboj kun jamboj kaj anapestoj. Pro sia aranĝo, tiu ĉi proverbaro estas tre utila por tiuj, kiuj interesiĝas pri metriko aŭ verkas versojn.

Jen tri eroj el tio, kio estas la multe diskutata/disputata kulturo Esperanta. Se anglalingva proverbaro apartenas al la brita, aŭ usona, aŭ kanada, aŭ aŭstralia, aŭ novzelandia, aŭ alia kulturo, al kiu kulturo apartenas la Esperantaj proverbaroj?!...

Ionel Onet

## VOJAGU ESPERANTE 1991

• **Esperanto Classes**—July 1-19  
San Francisco State University  
"The best in the world!"

• **E.L.N.A. Annual Convention**  
Raleigh-Durham, North Carolina  
July 20-25

(Although the Interkona VEspero does not take place until Saturday evening the 20th, it's a good idea if possible to arrive Friday night because the L.K.K. is providing a full program of optional Esperanto programs during the day on Saturday. If you can arrive on the 19th, you won't have to miss any of them.)

**AIR FARE IS EXPENSIVE THIS YEAR. BE SURE TO CONTACT ESPERANTO VOJAĜ-SERVO FOR DISCOUNTS ON THE AIR FARES TO RALEIGH-DURHAM AND BERGEN.**

• **76a UNIVERSALA KONGRESO**  
Bergen, Norway  
27 July—3 August

• **POST-KONGRESA EKSKURSO**  
3-12 aŭgusto

**RESERVE OUR ESPERANTO VIDEO-**

Lusi Harmon  
Esperanto Vojaĝ-servo  
6104 La Salle Ave.  
Oakland, CA 94611  
(415) 339-2001

### TAPE ABOUT BERGEN. IT'S GREAT FOR MEETINGS AND CLASSES!

#### Is it safe to travel this year?

As a professional in the travel business, I would not recommend traveling to the middle east this summer, but many destinations including Scandinavia are probably safer than staying home. It's certainly safer than driving on the California freeways! We have never seen more care taken to ensure the safety of travelers. It takes a lot longer to get checked in; you cannot check your bags at the curb; and there are a lot more questions about who packed your suitcase, who has had access to it, and what you have in it. We will certainly be traveling to Bergen this year, and we hope you will be able to join us!

Bergen is an ideal city for a convention. It is large enough to be interesting, but small enough to be easily managed. It is both "Norwegian" and international! It is also situated in one of the most beautiful areas in the world, has a delightfully mild summer climate, and is the gateway to fjordland. The convention program will be very interesting including beautiful concerts and theatricals in the comfortable and modern Grieg Hall.

EVS has reserved an affordable hotel in the center of town, about as close as you can get to the kongresejo, and we have reserved space on SAS Airlines with guaranteed fares back to the beginning of the fall season for the dates of the convention. This will prove to be a great savings for those of us lucky enough to go to Bergen!

### POST-KONGRESA EKSKURSO CRUISE FROM BERGEN: 3 Aug.

- To the North Cape
- To Lapland
- To the Land of the Midnight Sun
- Fly back to Oslo for 2 days before flying home: 12 August

The MS Lofoten can take you on a voyage along the most beautiful coastline in the world. To many people, crossing the Arctic Circle is an unforgettable experience. But it is when the mountain wall of the Lofoten Islands rises from the sea that words fail completely. The ship is an attraction in itself—a floating hotel, always on the way to new sights, new experiences, new adventures. You will enjoy service and meals you could expect in a first-class hotel. Yet the Coastal Express ships are not cruise liners. They are a means of communication for the local people; they carry goods to supply the needs of the coastal communities—and they are part of Norway's maritime culture!

The atmosphere on board is informal and relaxed. Scenes continually change, but slowly enough to allow you to absorb them; and to feel at one with the life of the coast and the mighty scenery that surrounds you.

**CRUISE WITH FELLOW ESPERANTISTS  
ENJOY NORWAY AT ITS BEST**  
Space is limited—sign up today!



## ELNA

President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (415) 222-0187

Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)

Secretary: Virginia Stewart (1992)

Treasurer: John B. Massey (1991)

Other Board Members: Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993)

Commissioners: Jim Deer (Tape Service), Joan Gildemeister (Legislative Affairs), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaupp (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Ellie Stein (Women's Affairs)

Director, Central Office: Mike Donohoo

Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

#### ELNA Dues for 1991

Regular	\$25
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15
Sustaining	\$50
Life	\$500

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$7.50 per year.

UEA dues 1991

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

**MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND!** If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

**DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1991(4) of Esperanto U.S.A. is April 25, 1991.**

**ELNA Newsletter**  
Volume 27, No. 2  
ISSN 0030-5065  
Esperanto League for North America, Inc.  
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530  
Telephone: (415) 653-0998  
Editor: Don Harlow